



N-ro 2 - 2006.07.30

Florenca Lilio

KURIERO DE LA 91A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Tiel la reprezentanto de la urbo, skabeno Giani, salutis la UK-anojn dum bunta inaŭguro, kiam miksiĝis amikecaj sentoj, orgojlodonaj eldiroj kaj gravaj atentigoj.

DANKON ESPERANTISTOJ, ĈAR VI HELPAS FLORENCON ESTI AGANTO DE PACO



Precize je la 10.14 ĉiuj UK-anoj de nia 91a kongreso ariĝis en “Fortezza da basso”, kiu, porokaze alinomiĝis “salono Zamenhof”, por ĉeesti la inaŭguron de nia kongreso. La horizontala aranĝo de la grandega spaco devigis realigi tri sektorojn: unu centra, fronte al la podio kaj du aliaj dekstre kaj maldekstre, kun grandaj televidaj ekranoj por spekti tion, kio okazis je la centro.

Tie supre sidis kelkaj reprezentantoj de nia bunta mondo: Charrière por TEJO, Petrović por ILEI, Pennacchietti por la kongresa universitato, Bakker - Corsetti - Nourmont - Yu Tao – Buller – Luin – Gutierrez – Wandel por UEA, Mattos por la Akademio, Grassini por la LKK. Kun ili la urba reprezentanto, skabeno Eugenio Giani, dum kun la publiko sidis aliaj gravaj reprezentantoj de la institucioj: la prefektoj (provincestroj) de Florenco kaj de Prato (urbo kie okazas la infana kongreseto). Al skabeno Giani oni prave kiel unue donis la parolrajton. Liaj vortoj emociigis la esperantistojn: li tuŝis la ĝustajn kordojn. “Via vokiĝo estas la sama, kiu enestas en la urba statuto: paco, solidareco, interkompreniĝo. Esperanto permesas komuniki inter la popoloj, interŝanĝi la esprimojn, stimuli la aliajn ke ili konservu kaj defendu sian kulturon: unu el la plej grandaj faroj de Esperanto estas ĝuste ĉi tiuj.

Antaŭ multaj jaroj - daŭrigis la skabeno - la tiama urbestro diris ke Florenco estas aganto de paco. Dankon esperantistoj, ĉar per via ĉeesto ĉi tie, el tiom multaj landoj, vi helpas nian urbon konservi la eblecon, ke ĝi estu aganto de paco”.

Sekvis la atendata saluto de Ludoviko Kristoforo Zamenhof (*teksto en la venonta numero*): li informis interalie, ke ĉi-jare la “medalon de toleremo” ricevos la internacia skolta movado. Antaŭe ĝin ricevis papo Johano Paŭlo la 2a.

Poste Corsetti inundis la ĉeestantaron per la forto kaj kvanto de la alvenintaj salutmesaĝoj: el italaj kaj alilandaj institucioj kaj el la movado. Inter la italaj gravuloj skribis ĉefministro Prodi, la vicĉefministro Rutelli, ministro Chiti, la ĉefepiskopo de Florenco, kard. Antonelli, la ambasadoro de Italio en Litovio. El aliaj landoj kaj el la movado, notiĝis la salutoj de Margareta Handzlik, de Marjorie Boulton, el la E-urbo Herzberg, el la urbestro de Bjalistoko, el pluraj ambasadoroj kaj honoraj konsuloj,

Muzika paŭzo, la unua el la tri altnivele prezentitaj de Andro Korobejnikov, enkondukis al pli spica momento: la ĝenerala prezento de la kongresa temo fare de François Grin, ne-esperantisto, kies belega prononcado de E-o ruĝigis vangojn de multaj eternaj komencantoj. Per sia prelego li resumis la raporton, kiu havas lian nomon, pri la kostoj de lingva hegemonio en Eŭropo, sed li ankaŭ iom pintigis la orelojn de tiuj, kiuj atribuis al lia esploro puran subtenon de Esperanto aŭ eĉ rekomendadon de nia lingvo (li nur uzis la ekzemplon de la Internacia Lingvo kiel simuladon de neŭtra situacio). Ĉiel ajn, la nuna lingva hegemonio donas transpagon de pluraj miliardoj da eŭroj al landoj kies merito – finfine - estas nur uzi denaske la anglan. La lasta instigo de Grin al esperantistoj estis, ke ili profunde studu la perceptadon de Esperanto ĉe la diversaj medioj por trovi la taŭgajn prezentomanierojn kaj plifortigi (aŭ eĉ redoni) valoron al Esperanto, por

agado kiu ne estu agadismo - farata de strategiuloj, ne de aktivuloj per si mem. La esperantistoj – li finis – devas pli multe agi en la strategio favore al lingva diverseco.

La aplaŭdoj ŝajnis montri principan aliĝon de la esperantistoj al la vortoj de Grin, sed verŝajne mankis io. Kaj pro tio kiam Corsetti alproksimiĝis al la mikrofono – por la prezidanta interveno - li sentis la devon emfazi kelkajn “niajn” aspektojn, kiujn – logike, kiel neesperantisto – Grin ne pritraktis. Kaj Corsetti faris tion kun tuŝo al la tero de Florenco: lia aserto, kiu plej surprizis onin, estas tiu ĉi: “Esperanto naskiĝis en Florenco”. Oni pensis ke la prezidanto de UEA volis flati la urbajn aŭtoritatulojn, per eldiro ŝajne paradoksa kaj troiĝa. Ne. La zorgoj de la ĉeestantoj pri la historiaj konoj de la prezidanto rapide forvaporigis kiam li klarigis, ke en Florenco naskiĝis la moderna pensomaniero, kiu metis je la centro la homon. Teknologio sen homo ne estas io utila. Esperanto apartenas al tiuj iloj, per kiuj la homoj komunikas inter si. Sen Renesanco, sen Florenco, ne ekzistis Esperanto. Pro tio la 91a UK okazas en ĉi tiu urbo. Kaj la dua motivo pro kiu oni elektis ĉi tiun urbon kuŝas en la fakto ke ĉi tie estas Davido. La beleco de tiu mikelanĝela statuo vualas la veran intencon de la aŭtoro, kiu faris ĝin kiam la urbo estis sub sieĝado. La senco estas, ke ni esperantistoj estas ĉiuj “davidoj, kiuj luktas kontraŭ Goljato’n”, li diris, komparante nian batalon por la lingva justeco fronte al la potenculoj de la lingva hegemonio, kun la evento rakontita en la Biblio. La instigo de Corsetti resumiĝis per bela petsopiro: “se Davido, je la fino, venkis, ankaŭ ni venkos; ni venkos se ni batalos por la

por la justeco, se ni insistos prezenti nin kiel vere ni estas: batalantoj por lingvo justa.”.

La inaŭguro daŭris per la tradiciaj momentoj de la salutoj. Kelkaj el tiuj de la “E-istaj instancoj” ĉi-foje estis (kiel diri?) aparte amoplenaj. Ni ne aldonos plion, sed nur citos, ke la prezidanto de ILEI avertis, ke “la kongresoj daŭras tro mallonge por krei esperantistojn laŭ natura metodo”, sekve, oni insistu pri la kursoj; la prezidanto de la Akademio havis la ĝentlemanan nuancon, sin adresi al “amataj samideaninoj kaj estimataj samideanoj”. Kun ili salutis ankaŭ la prezidanto de la LKK kaj la geresprezentantoj de TEJO kaj SAT.

Plej kortuŝan momenton oni travivis kiam oni anoncis la du novajn honorajn membrojn de UEA: Otto Haszpra (Hungario) kaj Umberto Broccatelli (Italio). Pri ili vi legos venonnumere.

Sekvis la tradicia, vere lumanta serio (*en la kazo de Finnlando, ne nur metafore*) da salutoj el la diversaj landaj asocioj, bildo pri nia movado. Ĉiuj salutis kaj profitis la okazon ankaŭ por inviti al siaj aranĝoj (kelkaj survojaj, kiel la baldaŭa IJK en Sarajevo; aliaj pli foraj, kiel la UK en Jokohamo; aliaj tradiciaj, kiel la himalajaj renkontiĝoj aŭ la landaj kongresoj). Ili ja rajtis, post kiam la prezidanto de UEA jam estis prezentanta recenzon pri la ĵus aperinta “Princo” de Machiavelli en Esperanto.

La kanto de la himno, fronte al la telekameraoj de kelkaj televidoj, bone disponigis kiel ĉiam ĉiujn por la kongresa semajno, startigita de la oficiala deklaro de la UEA-prezidanto.

Carlo Sarandrea

lastaj aliĝoj

2151	bds-m-y	S-ro Bernard Stollman, 596 Broadway Str 602 NY, New York 10012, Usono
2152		S-ro Massimo Ripani, Via Salv. Di Giuseppe 5/A., Italio
2153	mksv-o	S-ro Alexander Mikishev, Str. Bruria 5A/B, Israelo
2154		S-ino Elena Maggiolini, Via Cimabue 14, Italio
2155		S-ro Nikolaos Papatrezi, Kamvounion 3, Thessaloniko Greklando
2156		S-ino Varvara Papatrezi, Kamvounion 3, Thessaloniko Greklando
2157		S-ino Zita Garbaruiciene, S.Zukocesko 3-18, Kaunas Litovio
2158	oleb-h	S-ro Ole Blaust, Ny Kongasgade 18, Kopenhaveno Danio
2159		S-ro Piero Francesco Bellebono, Vicolo Vaglietti 2, 24055 Cologno al Serio Italio
2160		S-ro John Bellebono
2161	mvka-o	S-ro Martien van Kasferer, Scheenerstandt 22 1826 c/1, Nederlando
2162	rado-z	S-ro Peter Andras Rados, Hungario
2163		S-ino Maria Kinga Rados, 1031 Budapest, Varsa n.8.I.3., Hungario
2164	jnos-q	S-ro Janusz Ostrowski, 314-315 East First Str. Norim Vancouver, Brita Columbio, Kanado
2165	mgaz-a	S-ro Michele Gazzola, Via Giuliani 71C, 33100 Udine, Italio
2166		S-ro Francisco C. Sanchez, Urbaniecan Tossal Gros 24, Castello de la Plana, Hispanio
2167	bna-h	S-ro Ben Indestege, Garspeldoastad 23 3650 Lanhloor, Belgio
2168		S-ino Celine Bernard, 4 rue Saint Florent, 84100 Orange Francio

(daŭras je la 4a paĝo)

Ĝisdate pri la programo:



Junularaj eventoj - Diversloke en la kongresejo, kaj ĉe la TEJO-budo, troviĝas koloraj folioj kun listo de pli ol 12 okazaĵoj organizitaj de la junularo sub la titolo *JP en via poŝto*. Trovu, legu kaj partoprenu kiom ajn aĝa vi estas!

ISAE - Interesatoj pri la agado de ISAE bonvolu atenti ĝian kunsidon ĵaŭde je 14.15 en salono Migliorini. Lastatempe estis centjara ISAE-festo en la Esperanto-kasteleto en Tavoleto de la 23-a ĝis la 29-a de julio 2006. Plena raporto aperos en revuo *Esperanto* kaj la teksto de ĉiuj prelegoj aperos en la festa numero de *Scienca Revuo*. *Raportis Rob Moerbeek, KN 85*

Etnistoj - London, 31-an de julio je 16.00 en salono Migliorini, okazos kunsido de la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL) por debati la temon *Lingvoj en Italio: historiaj minoritatoj, dialektoj, lingvoj de enmigrintoj, federaciismo kaj aŭtonomioj*. Ĉiuj kongresanoj estas bonvenaj! Ĉiuj membroj de IKEL estas invititaj partopreni en ties membrokunveno; ne-membroj estos same bonvenaj. Eblos aliĝi surloke.

Kvizo - Mardon la unuan de aŭgusto, je la 17h00 en salono Canuto s-ro Marian Zdankowski (Pollando) kun helpantoj gvidos interesan kvizon kun multaj premioj, kiuj atendas Vin.

Amikaro Bruno Gröning - Okazos en salono Stoppoloni, marde je 11.15, kaj ankaŭ ripete ĵaŭde je 09.00 kaj vendrede je 09.00, sub la titolo *Saniĝo per Spiritaj Fortoj*, publika prelego de d-ro Dölmüller de la Medicin-Scienca fakgrupo de Amikaro Bruno Gröning. La prelego prezentos la evoluon de saniĝoj dokumentitaj de sendependaj kuracistoj; raportos saniĝintoj mem kaj oni klarigos kiel akcepti la spiritan sanigoforton laŭ la instruo de Bruno Gröning. *Raportis Detlef Meier, KN 330*

Kongresa Balo

La Kongresa Balo okazos lundon, 31-an de julio je 20.00 en la subtera etaĝo de *Palazzo degli Affari*. La enirejo estas inter la Libroservo kaj la Palaco mem.

Afrika kunsido

Kun la partopreno de pli ol tridek esperantistoj, ĉu aktivuloj ĉu interesitoj pri afrika agado, okazis en salono Grazzini dimanĉa kunsido pri Afriko. La partoprenantoj spektis diapozitivajn pri Burundio, kien vojaĝis Tereza Kapista kun helpo de UEA kiel parto de la projekto *Lingvo de Paco*. Kongresanoj el Benino (KN 1259) kaj Togolando/Ebura Bordo (KN 1560) raportis pri siaj agadoj kaj oni krome informis pri la agado de la Afrika Oficejo en Benino kaj la estontaj kongresoj en Burundio (aŭgusto 2006) kaj Niĝerio (ĉirkaŭ decembro 2006). *Raportis Maritza Gutiérrez, KN 76*

Komitatkunsido de UEA - La komitato de UEA kunsidis sabate posttagmeze. Ĝi faris preparajn decidojn por la posta laboro en ok subkomitatoj kiuj temos pri financoj, eksteraj rilatoj, edukado, informado, kulturo, landa/regiona agado, faka/scienca agado kaj junularo. Dumkongresa komisiono pri rezolucio konsistas el J Vergara, A G Rao kaj B Moon. La komitato traktis la estraran raporton kaj la financajn raportojn pri 2005 kaj akceptis ilin. La laboro de la semajno estos preparita en la subkomitatoj kaj vendrede la komitato denove plenkunsidos pri buĝeto, raportoj de la subkomitatoj, strategia laborplano kaj aliĝpetoj de novaj asocioj. *Raportis la Ĝenerala Sekretario de UEA, KN 81*

Invitoj

UNIKOM - La inventinto de softvara programo kiu celas uzi Esperanton kiel tradukan pontlingvon, D-ro Myron Bondelid, volas rekruti lingvistojn kaj aliajn interesitojn kiuj volas kunlabori pri la projekto uzi ĝin por traduki en la sekvajn lingvojn: hispana, portugala, germana, franca, hungara, rusa. Oni ĉefe planas uzi ĝin por sciencaj, teknologiaj, medicinaj kaj komercaj esploraj celoj. Vizitu la UNIKOM-budon aŭ informiĝu plu pere de help@unikom.org kaj www.unikom.org.

Lehm ja koiv: ĉi tiuj vortoj estas la titolo de finnlingva poemo *Bovino kaj betulo* kies E-traduko sekvas: "Mi volas esti bovino sub betulo. Mi ne volas esti kreiva. Mi ne volas ellerni novan enpaĝigan programon. Mi ne volas solvi la rilaton inter patrino kaj filino. Mi ne volas iri al la poŝtejo kun tiu letero. Mi ne volas telefoni al sinjorino oficisto pri sociasekuro. Mi ne volas enmemorigi "pin"-kodojn. Lasu min esti bovino sub betulo. Metu mian lacan haŭton sur plankon dormoĉambran antaŭ kahela forno". La poetino kolektas tradukojn de ĉi tiu poemo kaj invitas vin traduki ĝin en vian propran lingvon el la E-versio. Interesiĝantoj kontaktu Tuomo Grundström, KN 1647, tuomo.grundstrom@lailanet.fi.

Gazetara Servo - La samideanoj kiuj bezonas la komunikojn de la Gazetara Servo por traduki sialingven kaj sendi al siaj naciaj amaskomunikiloj, povos trovi la tekstojn en la Interreta paĝo: www.uk2006.info/rassegnastampa

Katolika pastro invitas al E-lingvaj Diservoj en la preĝejo de San Giovannino degli Scolopi, en strato Via Martelli. Dum la kongresa semajno okazos matene je la 8a Meso; vespere je la 16,15 ekumenaj vesperaj Diservoj. Informiĝu ĉe P. Bernhard Eichkorn.

Malaltekoste manĝi!

La italaj fervojistoj disponigas al ĉiuj kongresanoj rabatitan manĝon en la restoracio *TOSCANA RISTO*, Via Luigi Alamanni 6. Via Alamanni estas paralela al la centra stacidomo ĉe la flanko kie ne estas la kongresa centro. Eblas ricevi 7-procentan rabaton por ĉiuj unuopaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj pere de kupono havebla ĉe la akceptejo/informejo de la kongresejo. Tipa kompleta manĝo povas kosti nur EUR 7,50. Pagu surloke. Horaro: 11.00 - 15.00; 18.00 - 22.00.

Lastaj aliĝoj

2169	vez-j	S-ro Antonio Verdù Curtidors, 40-5-2 03203 Elche, Alicante Hispanio
2170	cola-z	S-ino Maroa Lucia Colagrossi, Via S.Pier Di Canne 82/8, Chiavari, Genova
2171	aflm-w	S-ro Antonio Martins-Tuvalxin, Estrada de Benfica, 692 c/v d. , PT-1500-111 Portugalio
2172	lugg-t	S-ino Eugenia Gay, Viale Leone, Palazzo Torre, 80055 Porlici, Italio
2173		S-ro Aldo Di Mascolo, Viale Leone, Palazzo Torre, 80055 Porlici Italio
2174	amze-1	S-ro Jomart Amzeyev, Skaftingebacken 3, 16367 Spanga Svedio
2175	ntsg-i	S-ino Natalja Gerlach, Skaftingebacken 3, 16367 Spanga Svedio
2176		S-ro Raul Salinas Monteaguado, Enrique Navarro 22/2, 46020 Valencia Hispanio
2177		S-ro Dennis Keefe, 5 rue de Fontenay Le Petit Jailly F-21500 Francio
2178		S-ro Claude Labetaa 17 Potissement de l'aerodrome 24330 Bassillac Francio
2179		S-ino Veronique Labetaa, 17 Potissement de l'aerodrome, 24330 Bassillac Francio
2180		S-ro Alberto Grilli, Via Montanari 51, 41037 Mirandola Italio
2181		S-ro Romano Grilli, Via Montanari 51, 41037 Mirandola Italio
2182		S-ro Fabian Kemps Verhage, Heyssehsstraat 84, 2023 JS Naarlem Nederlando
2183		S-ro Masao Tacimoto, 4-78 Midorigaoka, Nomi Ishikawa 923-1226 Japanio
2184		S-ro Christophe Castillon, 7 Avenue Rossina, 83790 Pignans Francio
2185	acve-g	S-ino Veronika Acsadi, Baratsag 4.17, H-9700 Szombathelm Hungario
2186	dato-p	S-ino Daniela Tagliafico, Via Don G.Verita 11/20, 16158 Genova Italio
2187		S-ino Norma Saccardo, Via Leopardi 5, 35010 Villafranca Padovana Italio

Pri la kongreso en gazetaro (30an de julio)

La Repubblica (frontpaĝe en la lokaj paĝoj) “Esperanto ĉu utopio aŭ demokratia lingvo?”. En unukolumna artikolo ĵurnalistino Beatrice Manetti, post ĝenerala priskribo pri la kongreso, publikigas la eldirojn de R. Corsetti konkludante, ke “*esperanto estas ĉefe demokratia lingvo*” sed “*parolas ĝin en la tuta mondo 2 milionoj da personoj (...) kaj ĉar “venki sur la angla estas fora perspektivo, la esperantistoj batalas sian batalon ĉefe en sia rondo*”. La artikolon finas prezento pri la Infana Kongreseto.

Quotidiano Nazionale (komuna eldono de 3 italaj ĵurnaloj). Ĝi aperigas unu tutan paĝon en la kultura sekcio, sub la titolo: “Sed, kiun lingvon vi parolas... ĉu Esperanton? – studuloj el la tuta mondo ariĝas en Florenco, en la nomo de globala komunikado”. La artikolon ornamas granda E-flago kun terĝlobo ĉirkaŭ kiu estas infanoj. La teksto ne evitas la uzon de kelkaj dubsencaj vortoj (ekz: “*la granda kirlaĵo de lingvoj nomiĝas Esperanto*”), kiuj povus doni mokeman etoson al la artikolo, sed finfine ĝi estas pozitiva, kaj la ĵurnalistino, post lego de la kongresa libro, agnoskas ke li “pli malpli” komprenis la legajon, “kaj tio estas pruvo – li finas - ke Esperanto estas vere facila. Kaj ĝi estus vere bela rimedo por ĉiuj konstruantoj de komunikado kaj dialogo”

Por kontakti la redakcion:

- Vi povas VENI al la Gazetara Servo, en Salono Fighiera-Sikorska, teretaĝe, en la kongresejo;
- aŭ Vi povas SENDI retroŝtan mesaĝon al adreso: <kontakto-lilion@yahoo.com>
- aŭ Vi povas TELEFONI al itala poŝ-telefono: (+39) 338 860 20 84. Al ĝi Vi povas sendi ankaŭ SMS'n.

Por la realigo de ĉi tiu 2a Lilio, kunlaboris Carlo Sarandrea, Diccon Mastermann kaj Maria Beloŝević

ĉu parencoj?



Pastro Bernhard Eichkorn
(KN 519)



Graziano Ricagno
(KN 859)

(daŭrigota)